

I, J

ILEI-SEKCIO, svisa

→*Instruado de Esperanto en Svislando*

INSTRUADO de Esperanto (en Svislando)

Jaron post la „unua provo ekplanti Eon en la ŝtonan teron de Svislando” far →*Alfred Paul Dubois* (1853-1918), lerneja direktoro en Le Locle/NE en 1898, kiel rakontas *EdEo* (1933), →*Ernest Naville* (1816-1909), mond-fama kristana filozofo, verkisto, pedagogo kaj sciencisto el Ĝenevo, rekomendis Eon en sia raporto (1899) al la Franca Akademio de moralaj kaj politikaj sciencoj (Instituto de Francio), kies membro li estis. Li proponis, ke la lingvo Eo estu instruata en ĉiuj duagrada lernejoj de la tuta mondo, ĉar li opiniis, ke la enkonduko de Eo subtenus la instruadon de la gepatra lingvo kaj helpus la studadon de klasikaj sciencoj. Se lia rekomendo eble ne tuj rekte kaj praktike efikis ĉe la instruinstancoj en la unuopaj landoj, ĝi almenaŭ certe influis la agadon de kelkaj gravaj e-istoj kiel Pierre Bovet kaj Edmond Privat (vd. sube), kiuj evoluigis kaj konkrete aplikis la pensojn de Naville kaj kiuj poste en unuopaj kazoj eĉ sukcesis efektiviigi la rekomendojn de Naville.

De la komenco la Eo-movadanoj konsideris, apud la informado, la I. kiel plej ĉefan, gravan kaj noblan taskon de sia propaganda agado. Unuajn eksperimentojn de la I. entreprenis →*Edouard Ducommun* (1865-1951), instruisto en Les Monts super Le Locle/NE. Ĉi tiu romanda pioniro malfermis en 1901 la unuan Eo-kurson por infanoj kaj en 1903 lanĉis Eo-korespondadon inter gejunuloj.

La svisa Eo-gazetaro raportis pri speciala kunveno de Eo-instruistoj en Schaffhausen en 1907, kiu estis vizitita de 30 fakuloj el Svislando kaj kiun ĉeestis la prezidanto de SES →*Friedrich Schneeberger* (1875-1926).


Grandan sukceson kaj influon havis la lernolibroj de →*Jean Borel* (1868-1946) kaj →*Edmond Privat* (1889-1962). Produktitaj kadre de la eldonejo Möller & Borel GmbH en Berlino, la kursiloj de Borel por germanlingvanoj (*Vollständiges Lehrbuch der Esperanto-Sprache mit Übungen, Syntax & Proben aus Poesie & Prosa*) ekde 1904 disvastiĝis en pli ol 100'000 ekzempleroj. La lernolibroj de Privat (*Manuel Pratique d'espéranto*, 1906; *Karlo*, 1909, *Kursa lernolibro*, 1911, k.a.), aperintaj en pluraj reeldonoj kaj adaptitaj al pli ol dek lingvoj, grave kontribuis al la populara rektmetoda I. ĉefe al franclingvanoj kaj multaj alinaciaj lernantoj. En 1910, la jaro de la fondo de *Internacia Asocio de Instruistoj* far la ĉeĥo Teodoro Ĉejka, Privat fondis kaj aktivigis la *Internacian Eo-Instituton (IEI)* kun sidejoj en Ĝenevo, Parizo kaj Novjorko (ekde 1930 ĝis la dua mondmilito IEI denove funkciis sub la nomo *Cseh-Instituto* kun sidejo en Hago, Nederlando).

Ankaŭ aliaj aktivuloj verkis lernolibrojn. En 1908 cirkulis la *Kompleta Lernolibro por Esperantistoj* de la argoviano →*Anton Waltisbühl* (1855-1940), eksa volapükisto kaj posta idisto, kaj la *Legolibreto por kursanoj* de la zurikano →*Karl Jost* (1876-1952). La sama aŭtoro aperigis lernolibron por blinduloj, *Volkstelehrbuch der internationalen Hilfssprache Esperanto* (1915). Diversaj kursoj okazis antaŭmilite inter blinduloj.

→*Jules Perlet* (1887-1964) verkis la lernokajeron *Ausführliche Grammatik der Esperanto-Sprache* (1922), laŭ kiu oni instruis Eon dum multaj jaroj; ĉi tiun lernolibron li adaptis poste ankaŭ al la bezonoj de la fervojistoj. Krom tio Perlet enkondukis la I. en la lernejon de la Unuiĝo por la bernaj oficistoj kaj dungitoj.

Historie decidan rolon ludis - kaj daŭre validas - por la I. la teorio pri vortfarado kaj -derivado de la ĝeneva matematikisto kaj interlingvisto →*René de Saussure* (1868-1943), kiun li ellaboris en 1910. René de Saussure estis la frato de la mondfama lingvisto Ferdinand de Saussure (1857-1913).

Fakte antaŭ René de Saussure la vortfaradaj klarigoj en la Eo-lernolibroj estis sufiĉe nebulaj kaj diverĝe prezentataj. Lige kun la apero de la reformprojekto Ido (1907/08) kaj instige de la ĝin sekvantaj esperantologiaj diskutoj, de Saussure komencis science analizi la teorion de la Eo-vortfarado kaj atingis kvazaŭ revoluciajn rezultojn. Lia elstara teoria kontribuo al Eo estis prezentita en la verko *La construction logique des mots en Espéranto* (Ĝenevo 1910). La konkludoj de tiu samtempe unua scienca analizo pri la vortstrukturo de Eo grave influis la lingvo-evoluon de Eo. En ĝi la aŭtoro eklumigis la esencon de la Eo-vortfarado kaj konvinke kontraŭ-argumentis la vortderivan teorion de Louis Couturat, la kreinto de Ido. Per tio la franca stilo influo de Louis de Beaufront en Eo malkreskis kaj esperantologio establiĝis.




Perbilda lingvo-lernolibro de G. Egli en la traduko de Henriko Fridori ĉe Orell Füssli en Zuriko

Laŭ raporto de la revuo *Esperanto* (n-ro 3/1921), en la ĝeneva kantono malfermiĝis esperopluna perspektivo por la I. La kantona registaro favoris la enkondukon de la I. en la sepan (lastan) klason de la unuagradaj lernejoj, kiel oficiala provo dum unu jaro. Laŭ *Esperanto* (1/1928) ĉi tiu eksperimento ripe-tiĝis en 1928/29, kiam la sama registaro decidis enkonduki la I. en la beletran fakon de la ĝeneva universitato. La kantona registaro vokis Edmond Privat por docenti kiel regula instruisto en la universitato pri historio kaj instrumentoj de Eo dum du jaroj. *Esperanto* 5/1928 raportis ankaŭ pri malbela incidento, nome ke la malfermo de la Eo-kurso en la universitato estis ĝenata de iu antisemitema grupo, kiu provis memori per protesthoro la hebrean devenon de L.L. Zamenhof. Sed la ĝenuloj estis tuj forpuŝitaj de la ĉeestantaj profesoroj, inter kiuj aparte indigniĝis la konata sciencisto Edouard Claparède (1873–1940), kiu apogis la aferon de Eo.

La signifa romanda pedagogo →*Pierre Bovet* (1878-1965) rekomendis kaj mem uzadis Eon kiel lingvon por propedeŭtikaj celoj kaj klopodis atingi ĝian internacian agnoskon kaj vastskalan enkondukon en la lernejojn. Li verkis plurajn studojn, prelegojn kaj broŝurojn pri la temo. Lia Instituto Jean-Jacques Rousseau en Ĝenevo iniciatis en 1922 la historie gravan *Ĝenevan konferencon pri la instruado de Eo*, aŭspiciatan de la sekretario de →Ligo de Nacioj (LdN); Pierre Bovet kaj Edmond Privat, kiu prezidis la internacian komisionon por Eo en lernejoj, ludis la organizan kaj gvidan rolojn. 16 registaroj sendis siajn delegitojn al tiu ĝeneva konferenco, krom tio alvenis reprezentantoj de diversaj neregistaraj organizoj rezidantaj en Ĝenevo, kiel Internacia Komitato de la Ruĝa kruco, Ligo de Societoj de Ruĝa Kruco, Kristana Unuiĝo de junaj viroj (YMCA) ktp. Tiel entute 100 delegitoj el 28 landoj kunvenis dum tri tagoj por aŭdi kaj diskuti pri novaĵoj lige kun la I. La svisan delegacion konsistigis 14 personoj el Ĝenevo (Bovet, Privat, Alphonse, N. Dubois, Rudhardt, Martin kaj R. Borsa), Neuchâtel (G. Stroele, E. Ducommun, W. Perrenoud, f-ino Straub) kaj Berno (E. Stettler, H.-J. Unger, E. Müller). Eric Drummond, la ĝenerala sekretario de LdN, malfermis la konferencon, kiu daŭris la 18-20ajn de

aprilo en Palaco Wilson. Ĝia oficiala protokolo estis publikigita en *Esperanto* (UEA), majo 1922, kaj aperis ankaŭ broŝure. La detala raporto estis ellaborita de →Georges Stroele kaj →Edouard Ducommun. (→Antologio)

Svislando kaj Esperanto-instruado.
Die Schweiz und der Esperanto-Unterricht.
La Suisse et l'enseignement de l'espéranto.
La Svizzera e l'insegnamento dell'Esperanto.



Panelafiŝo por ekspozicio kun Pierre Bovet

En rezolucio la delegitoj emfazis la propedeŭtikan signifon de Eo kaj konstatis, ke ĝi permesas pli facile lerni nacilingvojn - konstato kiun faris jam →Ernest Naville, →Auguste Forel kaj aliaj. La rezultoj de la konferenco de 1922 servis kiel argumentaro al la fama kontraŭdira debato pri Eo en LdN kaj al la enketo pri Eo en la lernejoj, kiu estis subvenciata de International Auxiliary Language Association (IALA), kiu siaflanke en 1930 okazigis en Ĝenevo internacian konferencon pri la demando de la neŭtrala universala lingvo. La Internacia Oficejo pri edukado en Ĝenevo kontribuis al la starigo de *Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj (TAGE)* okaze de la 16a UK en Vieno en 1924, kies revuo *Internacia Pedagogia Revuo* (fondita en 1926) favoris la disvolviĝon de la metodo-

logio de la I. La unua sesio de la *Somera Universitato en Eo*, iniciatita de Bovet kaj Privat, pasis kadre de la 17a Universala Kongreso en Ĝenevo (1925), en kiu elpaŝis pluraj signifaj fakuloj kiel ekzemple →Charles Baudouin.

En aprilo 1927 Bovet respektive Internacia Oficejo de edukado kunvokis en Prago duan internacian konferencon pri la sama temo sub la titolo 'Paco per lernejo'. La konferenco okazis sub la protekto de la prezidanto de la Ĉeĥoslovaka Respubliko, T.G. Masaryk, kaj sub la honora prezido de E. Beneš, ministro pri eksterlandaj aferoj, kaj M. Hodža, ministro pri publika instruado; la protokolo aperis en Ĝenevo.



SES-tago 1932 en Neuchâtel kun lingvaj ekzamenoj (la ekzamenantoj de dekstre: Stettler, Humberst, W. Perrenoud, G. Stroele


En oktobro 1929 pluraj e-istoj kiel Pierre Bovet, Edmond Privat, Hans Jakob k.a. partoprenis en la Tutmonda Edukista Kongreso en Ĝenevo (vd. foton sur aparta paĝo) de la fama Eo-instruisto Andreo Cseh. En 1931 Eo estis propagandata vastskale, tiel ke 350 personoj partoprenis la provlecionon. En aprilo 1932 sekvis en Svislando la sukcesaj Eo-kursoj de la rumano Tiberio Morariu, en 1939 tiuj de la svedo Persson kaj en 1947 tiuj de la norvego Nicolaisen. Tiuj kursoj altiris multajn novajn interesiĝantojn, ekzemple en Berno kaj aliloke.

Krom Andreo Cseh en St. Gallen (1946) ankaŭ Julia Isbrücker, konata nederlanda e-istino el Hago, ofertis Eo-kursojn en la Pestalozzi-infanvilaĝo en Trogen/AR (1947).

La 1an de novembro 1933 estis inaŭgurita *Svisa Esperanto-Instituto* sub la gvido de →*Eduard Spielmann* (1870-1938) en Berno. Ĝiaj esencaj agadoj estis la propagando, instruado, informado kaj utiligo de Eo. Pro la morto de Spielmann en 1938 la instituto ĉesis funkcii, sed estis restarigita post la milito en 1954/55 far →*Hanni Fischer-Buri* (1895-1961). Ŝia ĉefa tasko estis administri la *Internaciajn Feriajn Kursojn* en la →Kastelo Münchenwiler/BE, okazintajn en tiu periodo i.a. kun la partopreno de →*William Perrenoud* (1898-1984), Eo-kursestro kaj aŭtoro de la →*geonismo* (1955), →*La ora metodo* (1956) kaj de ties apliko *En tempo rekorda* (1960). La agado de Svisa Eo-Instituto definitive finiĝis en 1961 kun la forpaso de Fischer, kiu cetere sukcese enkondukis Eon en la instruprogramon de la popola alternejo en Berno.




Eo-instruistoj Tiberio Morariu, Lizeto Morariu-Andersson kaj Andreo Cseh



Julia Isbrücker, Paulus Geheeb

Inter 1951 kaj 1961 ankaŭ la popola altlernejo en Zuriko proponis Eon kiel instrufakon, dank' al la t.n. *Koordinitaj Esperanto-kursoj* (KEK), kiuj estis lanĉitaj de la zurika juristino kaj e-istino →*Tina Peter-Rüetschi* (1904-

1993). La kursoj mem estis realigitaj de →*Werner Laederach* (1912-2002) kaj →*Fritz Liechti* (1913-2001). La menciitaj aktivuloj ne estis profesiaj instruistoj, sed devenis de aliaj profesioj. Liechti aŭtoris perkasedan Eo-kurson por komencantoj (finitan en 1983). 'Koordinita' signifis, ke tiuj kursoj komenciĝu seeble samtempe en ĉiuj lokoj kaj estu samtipaj. La koordinitaj kursoj kun la samaj instrutekstoj efektiviĝis samtempe en Aŭstrio, Belgio, Britio, Danio, Italio, Francio, Nederlando kaj Svedio kaj spertis rimarkindan sukceson. Eĉ *Neue Zürcher Zeitung* raportis pri (13.10.1952).



La lernolibretoj de William Perrenoud

Gravajn kontribuojn al la I. faris ankaŭ la konata zurika ĵurnalisto kaj libroaŭtoro →*Arthur Baur* (*1915), honora membro de UEA, kun siaj kursoj *Eo in 5 Lehrbriefen* (1942) kaj *Eo per Post* (1958, reeldonita en 1963) kaj la nederland-devena matematikisto *Gérard Cool* (*1921), kiu 1948-51 instruis Eon kadre de la privata lernejo L'Ecole d'Humanité en Goldern-Hasliberg/BE. Ĉi tiu lernejo estis fondita de Paulus Geheeb (1870-1961), iniciatinto de Odenwaldschule kaj mem praktikanto de Eo.

→*Wilhelm Haase* (1885-1969), kiu naskiĝis en Germanio kaj laboris kiel apotekisto en Burgdorf/BE, Olten/SO, kaj Chur/GR, evoluigis la Eo-kurson *Eo in fünf Lehrbriefen* por la privata uzado en malgranda lernrondo.

En 1956 la instruisto →*Marcel Erbetta* (1911-96) en Biel-Bienne/BE lanĉis la originalan projekton →*Graĵnoj en vento*, kiel frukton de la Freinet-pedagogio. La franca instruisto de popollernejoj kaj reformpedagogo Célestin Freinet (1896-1966) baziĝis sur la kredo, ke

la infanoj libervole volas lerni, ke oni devas ŝanĝi la metodon de la I. kaj adapti ĝin al la bezonoj de la lernantoj, se la infanoj malemas lerni, ke la instruisto aŭ instruistino servu la infanojn kiel helpanto kaj ne kiel estro. En la Freinet-metodo gravas la esplorado, la malkovrado, la spertoj kaj la motivacio de la infanoj. La lernadon de la infanoj subtenas diversaj materialoj, parte kreitaj de la lernantoj mem. La lernantoj lernas individue aŭ en grupoj, pri ilia laboro decidas la konsilio de la klaso, kiu estu formita kiel kooperativo. Fakte ankoraŭ nun la Freinet-pedagogio kaj la institucioj, kiujn Freinet fondis, ludas gravan rolon en la francaj kaj ankaŭ romandaj lernejoj. En Svislando ekzemple la porinstruista lernejo de Neuchâtel diskonigis tiun ĉi metodon kaj favoris ĝian praktikon en la publika instruado. En julio 1958 Erbetta organizis internacian pedagogian renkontiĝon en Broc/FR sub la aŭspicio de la Freinet-movado kaj kun la partopreno ankaŭ de e-istoj.




Marcel Erbetta kun infanoj

Grajnoj en vento mem disvolviĝis per kajeroj kadre de interlernejaj rondoj funkciantaj samtempe en plej diversaj landoj kaj grupigis dekon da klasoj. La unika kaj sufiĉe sukcesa eksperimento, kiu esence vigligis la I., daŭris dekon da jaroj. Bedaŭrinde, kiel en aliaj pli fruaj kazoj, ankaŭ ĉi tiu esperoplena agado suferis pro la manko de apogo, financa kaj kunlabora, fare de la ĉefaj Eo-institucioj kaj ĉesis ekzisti, kiam Erbetta retiriĝis pro maljuniĝo.

En tiu tempo la I. povis esti portata en la publikajn lernejojn dank' al la klopodoj de la sekvanta instruista triopo en Romandio: unue

→ *Claude Gacond* (*1931) en La Sagne/NE. Pretiginte kadre de sia instruista diplomigo instruplanon de Eo, li eksperimente instruis Eon en la lernejo de la vilaĝo La Sagne/NE (1956) kaj poste en La Chaux-de-Fonds (1977/78). La oficiala eksperimenta kaj liber-vola I. estis realigita de marto 1977 ĝis majo 1978 al gelernantoj de la kvara kaj kvina klasoj de la baza lernejo La Promenade en La Chaux-de-Fonds. Ĉi-koncerna raporto estis publikigita de la Komisiono Eo lernejen en 1979.



Profesiaj instruistoj: Claude Gacond, Charles Ecabert kaj Marcel Erbetta



Claude Gacond instruas Eon al klaso de la baza lernejo

La samon faris → *Michel Frésard* (*1930) en Les Bois/JU (1959). Ĉi tie, kiel ankaŭ en Le Prédame, Frésard okazigis Eo-renkontojn, kiuj kunigis pedagogojn, gelernantojn, gepatrojn kaj membrojn de la aŭtoritatoj.

Ankaŭ la kuzo de Frésard, → *Charles Ecabert* (1913-62), diplomita teologo kaj instruisto de la latina, greka kaj franca lingvoj en Neuchâtel, pledis por la enkonduko de Eo en la lernejojn kaj en 1960 kunorganizis la trian manifestacion *Eo lernejen* en sia urbo. Ecabert lernis Eon ĉe Gacond kadre de kurso organizita en la porinstruista lernejo en Neuchâtel.

Poste al unu el siaj klasoj en la duagrada lernejo, sekcio latina, Ecabert komencis eksperimente instrui la verkadon franclingvan pere de tradukoj el Eo. La koncernaj gelerantoj akceptis frekventi unu horon pli en la semajno por unue lerni Eon kaj poste efektivi tradukajn ekzercojn. Fakte Ecabert raportis pri tio al la instruistaro, sed lia subita akcidenta morto malebligis la publikigon de skriba raporto.



Andrée Gacond kaj Michel Frésard

La 9an de februaro 1958 en Biel-Bienne/BE (hotelo Schlüssel) estis fondita *Esperanto-Edukistaro de Svislando* (EES) esence fare de 15 svisaj e-istoj kun jenaj laŭstatutaj celoj: ligi svisajn e-istojn, kiuj instruas Eon kaj kiuj plenumas edukon ralon, vastigi la I., trakti problemojn de la edukado ĝenerale kaj prui al edukaj instancoj la avantaĝojn de la enkonduko de Eo en la lernejojn. La fondaj membroj de EES, kiu komprenis sin kiel sekcion de ILEI, estis: →Sonja Brun, →Marcel Erbeta, →Claude Gacond, →Olivier Tzaut, →Michel Frésard, kiel estraranoj; →Max Abegg, Ruth Burkhart, →Hanni Fischer-Buri, →Walter Giannini, →Bruno Graf, Jean-Paul Humberstet, Trudi Kùchler, Marcel Moreillon, →René-William Perrenoud, →William Perrenoud, Georges Renaud, Willy Voirol, kiel membroj kaj aktivuloj. →Edmond Privat kaj →Pierre Bovet ne ĉeestis, sed estis elektitaj kiel honoraj membroj.

Ligita kun la agado de EES, kiu kunlaboris kun ILEI, EJS kaj aliaj organizoj, kaj kiu lanĉis diversajn ekspoziciojn kaj konferencojn kun la celo atentigi la lerneajn aŭtoritatojn pri la aktivecoj de la Eo-lingvaj in-

struistoj, estis la regula organizado de la Eo-skiferioj en Adelboden, dum kiuj la e-istoj ricevis la okazon praktiki Eon.

Dum la kongreso de Svisa Fervojistaj Sindikato (SEV) en 1964 en Interlaken, partoprenata de 800 personoj, kaj en ĉeesto de oficialaj reprezentantoj de politikaj kaj fervojistaj instancoj kaj de la gazetaro, estis traktita rezolucipropono rilate la enkondukon de Eo en la lernejojn. (→Fervojistoj)

La laboro kadre de EES kuraĝigis ĝiajn aktivulojn riski novajn pionirajn paŝojn. La analizado de la situacio pri la I. farita meze de la 1960aj jaroj ja konsciigis la EES-anojn pri la enorma plenumota laboro ĝis kiam Eo troviĝos en la oficialaj instruplanoj. Tiu analizo montris ankaŭ la neceson starigi centron, kies tasko estus kunordigi la agadojn de la Eo-instruistaro, kiu ĝis nun estis tro diversa, disa kaj individua. Dum la 70-80aj jaroj la agado de EES estis daŭrigata esence kadre de la *Komisiono Esperanto lernejen* de →*Kultura Centro Esperantista* (KCE). KCE mem estis fondita en 1968 en Biel-Bienne esence de la EES-anoj, ĝia administrado troviĝis en la privata domo de Claude kaj Andrée Gacond en La Sagne/NE, ĝis kiam la centro ekinstaliĝis en La Chaux-de-Fonds ekde 1974.

La ĉefaj motoroj de la komisiono nomiĝis →*Olivier Tzaut* (*1935), bazlerneja instruisto en Mont-Soleil/BE, →*Claude Piron* (*1931), tradukisto kaj psikologo en Ĝenevo, kaj *Jean-Jacques Lavanchy* (*1934), metilerneja instruisto en La Tour-de-Peilz/VD. Claude Gacond mem fariĝis la direktoro de KCE (ĝis 1991). Samtempe li oficis kiel arkivisto de *Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia* (→CDELI), kies komenco en la urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds reiras al la jaro 1954 kaj kiu estis perstatute oficialigita en 1967.

Kiel fako de KCE estis establita *Internacia FERIA Altlernejo* (IFA), kadre de kiu disvolviĝis akademiecaj prelegsesioj kaj ekzamenoj laŭ la normoj de UEA-ILEI. Kiel unua rektoro de IFA oficis →*Claude Piron* (*1931), konata Eo-verkisto kaj -preleganto, kies krimromanoj, verkita en facila lingvo, fariĝis movadaj sukceslibroj kaj daŭre estas ŝate uzataj dum la I. La ĉefa scienca kunlaboranto de KCE sur la kampo de la didaktiko kaj metodologio de la I. estis la hungara profesoro-

ro *István Szerdahelyi* (1924-87) de la budapeŝta teknika universitato Eötvös Loránd (Elte). Post la morto de Szerdahelyi la plej signifaj kunlaborantoj de KCE ĉi-terene fariĝis Ilona Koutny el Hungario kaj Irena Szanser el Pollando. Kun KCE/IFA kunlaboris ankaŭ la aktivuloj ĉirkaŭ →Kooperativo de Literatura Foiro (LF-koop), precipe *Giorgio Silfer* (*1949) kaj *Perla Martinelli* (*1938), donante al tiu institucio apartajn kulturajn kaj intelektajn dimensiojn.




Profesiaj instruistoj: William Perrenoud, Jean-Jacques Lavanchy kaj Dante Bertolini

Sub la gvido de Gacond en la 1970aj jaroj la instrudepartemento de la berna kanton aranĝis enkondukajn Eo-kursojn por instruistoj en Moutier/BE, La Combe du Pelu/BE kaj Mont-Soleil/BE. Tie i.a. la tiĉina pedagogo →*Dante Bertolini* (1911-98), kiu partoprenis la aranĝojn en la Berna Ĵuraso, fariĝis aktiva samideano kaj portis la esperantan stelon al sia kanton, tiel ke la urbo Locarno disponigis al li ejojn en la publikaj lernejoj. Dum pluraj jaroj Bertolini eksperimente instruadis en la bazaj (elementaj) klasoj de la porinstruista lernejo. En Locarno Eo estis instruata ankaŭ de *Irene Molinari* (1896-1994), kiu estis konata profesia instruistino en la iamaj popolaj mezlernejoj en Locarno. Per ŝia sindona Eo-kursumado ĉe la lingvolernejo de Migros en Locarno ŝi esence kontribuis al la disvastigo de Eo en Tiĉino. →*Tazio Carlevaro* (*1945), psikiatro en Tiĉino kaj konata interlingvisto, ofte instruadis, en Bellinzona kaj aliloke, en la lingvolernejo Migros kaj en renkontiĝo-ĉambroj de restoraciejoj, okaze de regionaj kulturaj semajnfinoj.



Svisaj Eo-bardoj kun pedagogiaj intencoj: Claude Piron (supre) kaj Olivier Tzaut (sube)



Aliaj instrumentoj: Per la t.n. *perbilda I. strukturŝanĝa* evoluigita de Claude Gacond kunlabore kun la hungar-devena psikopedagogo *Stefano Keller* (*1953) surbaze de la Cseh-metodo, kaj precipe per la *perkorrespondanta kurso programita* por franc- kaj germanlingvanoj, ellaborata de Claude Gacond kaj Herbert Mayer, kiu fariĝis direktoro de Internacia Esperanto-Muzeo (IEM) en Vieno, Eo povis esti instruata al centoj da homoj diverslandaj kaj diversaj. En la vico de la originalecaj Eo-instrumentoj estas menciinda ankaŭ la t.n. *Rika metodo*. Ĉi tiu metodo estis evoluigita de *Marc Rohrbach*

(1904-93), la gvidanto de la filozofieca J.E.A.N.-movado (t.e. Juneco spirita, Edukado de si mem, Ardo en la laboro, Nobleca konduto), kiu utiligis Eon por efektivi siajn pedagogiajn celojn. En Eo Rohrbach malkovris kvazaŭ taŭgan rimedon por „ilustri la revolucion lingvogramatikan teorion“ de Eo kaj por „kultivi la logikan pensadon“. La metodo, kiun Rohrbach evoluigis en la 1970aj jaroj por ilustri la funkciadon de la unika teorio de la Eo-gramatiko, pruviĝis kiel sufiĉe alloga enkondukilo en la lernadon de Eo, kvankam tiu metodo en iuj momentoj neeviteble evidentigis konflikton kun la gramatika kaj vortfara logikoj. La ĉefa intenco de la metodo estas ebligi al la lernantoj, diskodantaj la vortelementojn, sonojn kaj la ritmon de la lingvo, tuj percepti la esencon de la lingva konstruo de Eo, emancipiĝi de la propraj lingvaj kutimoj (franclingve: déconditionnement linguistique) kaj ĝenerale pli facile aliri ĝian praktikan uzadon. Tiel la Rika metodo montras interesan varianton de la rekta metodo: la lernanto estas devigata paroli ekde la unua momento, malkovrante gramatikan teorion per kreiva praktiko (G. Silfer). En Svislando precipe *Lucienne Dovat* (*1919) en Renens/VD praktikis la rik-metodan I., ĉe KCE kaj aliloke.

La popolkanzonoj de Claude Piron kaj de la pedagogo Olivier Tzaut, kiujn aŭskultis kaj kantis multaj kurskomencantoj, apartenas al la klasika Eo-kantarto.

Interesajn ideojn pri demokrata pedagogio, mondĉivitaneco kaj laikeco en la I., kombinis kun sia porpaca aktivado → *Jacques Mühlethaler* (1918-94), la fondinto de *Monda Asocio por la lernejo kiel pacinstrumento (EIP)*. Ĉi tiu organizo instaligis en 1967 en Ĝenevo kaj estis funkciigata kaj prezidata de Mühlethaler dum kvaronjarcento. Mühlethaler konstatis en Eo paralelon al siaj pacideoj kaj tre aprezis ĝin kaj publike atentigis pri ĝi en diversaj okazoj, kiel dum la kunvenoj de Unesko kaj de la neregistaraj organizoj, substrekante ĝian porpacan karakteron kaj rekomendante ĝian mondvastan aplikadon. Por rememorigi: En 1954 estis akceptita la unua rezolucio de Unesko, kiu per tio kiel grava mondorganizo klare agnoskis la kulturajn valorojn de Eo (duan similan Eo-rezolucion Unesko akceptis en 1985).

Kunlaboro kun ILEI kaj UEA: En 1973 → *Kurt Greutert* (*1927), fervojisto el Argoivio vivanta en Tiĉino, konstatis la mankon de svisa ILEI-sekcio kaj mem fondis ĝin, kvazaŭ kiel konkurencon al EES. La 15an de julio 1974 do estis starigita *Svisa Asocio de Esperanto-Instruistoj (SAEI)* kiel membro de ILEI. Ĝiaj estraranoj estis: Kurt Greutert (prezidanto/kasisto), Sandro Ribli (sekretario), Verena Chaves-Walder (asesorino), → Paul Bächli kaj Ruth van Puijenbroek-Walder (revizoroj). Fakte SAEI ne montriĝis vivipova kaj esence restis la infano de ĝia fondinto, kiu kiel fervojisto fakte havis neniujn verajn rilatojn al la instruista medio.



Profesiaj instruistinoj: Nicole Margot, Lucienne Dovat, Mireille Grosjean

La svisa ILEI-sekcio mem reviviĝis en 1978 dank' al la klopodoj de Erbeta, Tzaut kaj Gacond. Sed ĝi fakte ne estis tre necesa pro la ekzisto de EES, KCE kaj ties Komisiono Eo lernejen. Fine de la 80aj jaroj la svisa ILEI-sekcio estis gvidata de *Edgar Jobin* (+1998), Le Locle/NE, → *Mireille Grosjean* (*1946), Les Brenets, kaj → *Nicole Margot* (*1943), Laŭzano, ĉiuj instruistoj. Kiam Grosjean estis prezidantino de KCE (1988-94) ŝi organizis, kadre de la svisa ILEI-sekcio, kunvenojn pri pedagogio kaj fremdlingva instruado. Al la membroj de la svisa ILEI-sekcio apartenis/as ankaŭ → Dante Bertolini (Locarno), → Jean Jacques Lavanchy (La Tour-de-Peilz/VD), → Claude Piron (Coppet/VD) → Guido Appius (Basel), → Tazio Carlevaro (Bellinzona) Cosette Cop (poste Sandoz, La Chaux-de-Fonds), Lucienne Dovat (Renens/VD), Nancy Fontannaz (Pully/VD), Renate Heer (Muri b. Bern), Jean-Thierry von Büren (Savagnier) k.a. La relativa modesta agado de la svisa ILEI-sekcio havas ankaŭ praktikan kialon: se

oni enkondukus grandskale la I. en Svislando, mankus disponeblaj geinstruistoj. Pro tio la plej urĝa tasko por la ILEI-sekcio estus varbi novajn e-istojn por larĝigi la bazon kaj formi novajn Eo-instruistojn.



François Randin gvidas Eo-kurson en Laŭzano

Aliaj agadoj: En Ĝenevo, la juristo kaj fervojisto → *Andres Bickel* (*1954) aplikadis la *perludan paroligan I*. Lia sukcesa kursgvidado (akompanata de teatrumado kaj skeĉoj) estis ŝatata ankaŭ dum kulturaj semajnfinoj organizitaj de SES.

En *Lucerno* Eo estis instruata dum pluraj jaroj kadre de la lingvokursaro de libertempa studcentro de COOP fare de membroj de la lucerna ES (unuavice de *Franz Brügger* kaj → *Sonja Brun*). Bedaŭrinde tiuj anoncitaj kursoj ne ĉiam efektiviĝis, ĉefe pro la manko de aliĝintoj.

En *Zuriko*, alternativan vojon sur la kampo de la I. iradis la lingvisto → *Dietrich Michael Weidmann* (*1960) per siaj mem kreitaj lernolibroj kaj vortaroj (kiel *Fernkurs Lingvo Internacia für Anfänger*, 1979, *Esperanto por mondcivitanoj*, 1992, *Weltsprachenwörterbuch Deutsch-Esperanto*, *Esperanto-Deutsch* 2003, k.a.), kiuj aperis en la propra eldonejo de Weidmann (Mondo Servo). Rimarkinde estas, ke tra tiuj eble iom nekonvenciacaj Eo-lerniloj kaj la varbagadoj de Weidmann multaj novaj e-istoj povis esti atingitaj. Lia diplomverkaĵo portis la titolon *Das Kausativ und das Antikausativ in der gemischten Plansprache Eo* (La kaŭzativo kaj la antikaŭzativo en la miksitaj planlingvo Eo, 1989) kaj estis akceptita kadre de ĝenerala lingvo-scienca de la zurika universitato).

La Chaux-de-Fonds: Sub la metodika titolo ‘Gaconda metodo’ la aŭtoro Claude Gacond ekde jaroj ellaboras kaj aplikas siajn *Didaktikajn konsilojn al instruantoj kaj studentoj de Eo*. Li instruas Eon kadre de la studsabatoj por komencantoj kaj progresemluloj ĉe CDELI aŭ kadre de renkontiĝoj por pedagogoj. De tempo al tempo en CDELI okazas ankaŭ prelegoj de fakuloj pri la historio de la Eo-movado k.s. Paralele KCE daŭrigas sian propran instruprogramon.

Lernejo La Grande Ourse: La filozofio de la privata alternativa lernejo *La Grande Ourse* en La Chaux-de-Fonds, kiu estas gvidata de *Véra Zaslavsky*, magistrino pri edukaj sciencoj, estas inspirata de la pedagogiaj ideoj de Freinet kaj de la konata romanda pedagogino *Marguerite Bosserdet* (1886-1967), kiu estis signifa pionirino de la reformita kaj alternativa lernejo en Romandio. Post studoj ĉe la neŭŝatela universitato kaj ĉe la ĝeneva Instituto Jean-Jacques Rousseau (gvidata de → *Pierre Bovet*), Bosserdet dediĉis sian laboron al la disvolvo de alternativaj instruformoj en la lernejoj, kiu kondukis al sukceso kadre de la *Nova Lernejo Ecole nouvelle des Terreaux* (Neuchâtel 1929-39).



Marguerite Bosserdet

Kvankam Bosserdet estis kritikata flanke de konservemaj pedagogoj, ŝia didaktiko pli kaj pli radiis al la publika instruado. Okaze de la reorganizado de la pedagogio ekde la 50aj jaroj en la kanton Neuchâtel, la *Ecole normale cantonale*, direktita de Laurent Pauli kaj Adolphe Ischer, nomumis ŝin esti gvidantino de unu el la modelaj klasoj de la porinstruista lernejo. Interese menciigi estas la cirkonstanco, ke Bosserdet mem ekstudis Eon kiel 80-jarulo, pere de kurso de Claude Gacond

(kiu siaflanke estis lernanto de Bosserdet en la baza lernejo, 3a kaj 4a lernejaj jaroj). Pro ŝiaj diversaj meritoj favore al Eo, la lernejo *La Grande Ourse* ne nur baptis sian domon, aĉetitan en 1992 de GEP/KCE ĉe strato Recrêtes 18 en La Chaux-de-Fonds, je la nomo de Bosserdet, sed enhavas en sia instruprograme ankaŭ la lingvon Eo, kun ŝanĝiĝantaj instruistoj, ekzemple Monika Molnár el Hungario. Sed ankaŭ direktorino Véra Zaslavsky mem, kies familio estis en bonaj rilatoj kun Edmond Privat, estas inter la Eo-instruantoj de sia lernejo.

Krom Célestin Freinet (1896-1966) la ideojn de Bosserdet bonvenigis famaj pedagogoj kaj psikologoj kiel Ovide Decroly (1871-1932), Alice Descœudres (1877-1963), kiu luktis kontraŭ militismo kaj alkoholismo, aliĝante al la kooperativa movado, kaj verkis pri Zamenhof, kaj Adolphe Ferrière (1879-1960), kiu aliĝis al la Eo-movado en 1929, sed restis ekster ĝi. Tamen li aperigis artikolojn pri problemoj de la I. en la revuo *Esperanto*, kaj lia franclingva teksto *Transformons l'école* estis tradukita en Eon de Henriette Ith kaj eldonita de UEA. Inter diversaj inspirintoj troviĝis ankaŭ la romanda psikologo, sociologo kaj fakulo pri edukado Jean Piaget (1896-1980), kunlaborinto de Bovet.

Lernolibroj: Ĉar en Svislando vivas homoj kun germana, franca kaj itala gepatraj lingvoj, estas nature, ke la Eo-instruistoj dependas de lernolibroj kaj vortaroj el Germanio, Aŭstrio, Francio kaj Italio, kiam ili devas anstataŭigi la mankantajn svisajn librojn. Plej disvastigitaj estas la klasikaj lernolibroj kaj vortaroj, por germanlingvanoj de Wilhelm & Hans Wingen, Hermann Behrmann, Max Butin/Josef Sommer, Franz Okelmann kaj Erich-Dieter Krause kiel ankaŭ pli novstilaj verkoj de Herbert Mayer k.a. Por franclingvanoj estas uzataj la lerniloj de André Ribot, Pierre Delaire kaj de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), de Roger Léger/André Albault, Gaston Waringhien (1901-91) kaj de Jacques Le Puil/Jean-Pierre Danvy. Por itallingvanoj cirkulas la verkoj de Umberto Broccatelli, A. Menabene, F. Barbalace, Renato Corsetti, Bruno Migliorini k.a. La sola konata lernilo por svisaj romanĉoj aperis en la serio de la *Ŝlosiloj* el la jaro 1922! Certe ne estas hereze

postuli novan, pli modernan lernmaterialon por la I.

Ekzamenoj: Jam en 1903 la regularo akceptita de la jarkunveno de SES en Rolle enhavis paragrafon pri la eblo aranĝi Eo-ekzamenojn. En julio 1904 *Svisa Espero* publikigis regularon por la disdono de kapableca diplomo. Tamen ankoraŭ ne estis mature realigi la ekzamenojn. En 1906 presiĝis detala regularo en *SE*, ellaborita de Hector Hodler kaj Edmond Privat. Ĝi utilis por la bernaj ekzamenoj dum la jarkunveno de SES en 1907. La juĝantoj jam posedis la francan diplomon pri kapableco aŭ estis konataj Eo-verkistoj aŭ instruistoj (→Friedrich Schneeberger, →Jean Wenger, →Jean Borel, Edouard Mallet, →Jakob Schmid, →Hector Hodler, Théodore Renard). La sukcesinto en la ekzameno ricevis la titolon *diplomita instruisto de Eo*. Inter la unuaj tiamaj kandidatoj troviĝis →Karl Jost, Albert Noetzli, Fritz Wenk, Paul Humberstet, Emma Herzog.



Sukcesaj ekzamenaj kandidatoj ĉe KCE en 1994

En *SE* 2/1934 reaperis alvoko pri novaj ekzamenoj de SES, en kiuj laŭ posta raporto de la ekzamena komitato sukcesis →Jules Gilliard kaj kelkaj aliaj kandidatoj. Dum la dua mondmilito la ekzamena komitato estis prezidata de →Marcel Jaccard. En tiu epoko oni distingis du ekzamenajn kategoriojn: la *atesto*


pri lernado, kiu postulis la korektan legadon de simpla teksto, ties parolan tradukon, komprenon de demandoj pri ĉiutaga temo kaj respondojn al ili, tradukon en Eon de mallonga teksto nacilingva, rakonteto, letero, helpe de vortaro. Por ricevi la *superan diplomon* la kandidato devis legi kaj traduki parole pli malfacilan tekston, traduki skribe, sen vortaro, ian literaturan aŭ fakan prozaĵon en Eon, verki samlingve kaj samkondiĉe pri donita temo, fari lecionon pri gramatiko, respondi demandojn pri Eo-lingvo, -movado, -literaturo kaj ĉefe korekte prononci. En KCE, ekzemple en 1993 kaj 1994 ree okazis ekzamenoj laŭ la normoj de ILEI/UEA. Bedaŭrinde ĉi tiuj Eo-ekzamenoj ĝuas, krom eble en la Eo-movado mem, neniun prestiĝon, almenaŭ en Svislando, tiom longe ke Eo ne ĝuas la statuson de agnoskita lingvo.

INTERPOPOLA KONDUOTO (libro)

Ĉi tiu libro de →*Edmond Privat* (1889-1962), franclingve eldonita de la Filozofia Kolekto Felix Alcan en Parizo en 1931 kaj en Eo publikigita ĉe Literatura Mondo en Budapeŝto en 1935, elstaras en la Eo-literaturo kiel klarvida provo analizi la genezon de la malamo, perforto kaj milito inter la gentoj. Per ĝi Privat celis priskribi la problemojn de la naciaj fiero, patriotismo kaj egoismo ĉe la popoloj, klopodis klarigi la erarojn de la naciismo, ŝovinismo kaj mesiismo, la sekvojn de la imperiismo kaj intencis montri la kontraŭdirojn de la nacia(j) moralo(j) en konflikto kun aliaj. Kiel ideologo - aŭ filozofo - de la I., Privat akre kritikis la vantecon de la gentoj, la sovaĝecon de la militantaj civilizoj, la hipokritecon en diplomatio kaj nesincereco en interŝtataj rilatoj. Li atentigis pri la malmoraleco en la politika kaj armea praktikoj kaj skurgis la ekscesojn rezultantajn el pasio kaj venĝo en la nomo de la „nacia religio“, kiel Privat nomis la troigitan patriotismon aŭ naciismon.

Kiel Privat raportis en koncerna ĉapitro en la libro *Aventuroj de pioniro* (1962), li ekverkis en 1928 libron en la franca lingvo pri la konduto de nacioj inter si kaj pri la kolektiva psikologio de popoloj. Ĝi estis la rezulto de propraj studoj, observoj kaj spertoj. Privat

estis instigita verki ĉi tiun libron unuavice pro la okupiĝo pri la historio de la popolaj ribeloj naciliberigaj, la enketoj ĉe la slavaj popoloj de Orienta Eŭropo, kiuj estis emancipiĝantaj ĉu de la rusa, ĉu prusa, ĉu aŭstra, ĉu turka jugoj, kaj lia persona partopreno en la kunsidoj de →Ligo de Nacioj (LdN), kie li fariĝis rekta atestanto de la ekesto kaj de la laboroj de tiu mondorganizo, kiu estis fondita en 1918/20 kaj kie sidis ne nur la malnovaj grandpotencoj, sed ankaŭ la novaj ŝtatoj de Eŭropo. Do I. estas ankaŭ konsiderebla kiel la transformita protokolo de la kunsidoj de LdN, en kiuj Privat partoprenis.




Gravega libro de Edmond Privat: *Le Choc des Patriotismes* (angle: *The Clash of Loyalties* kaj en Eo: *Interpo-pola Konduto*).

Por fortigi siajn teoriojn Privat uzadis ilustrajn ekzemplojn – je ili liaj verkoj estas plenplenaj. La militon Privat difinis kiel „la senteman punkton, kie du moraloj interbatiĝas kun siaj du kontraŭaj kutim-potencoj“. Pri LdN, funkcianta inter 1920 kaj 1945, Privat observis, ke en ĝi blovis ne nur tro da naciismo, sed opiniis, ke mankis al ĝi ankaŭ iu specifa spirito – li nomis ĝin mistiko – kiu vere naskus federacian senton ĉe la popoloj. Pri Eo li komentis, ke male ĝi „entenas ĝuste tiun amikeman mistikon – senkoleran kaj senmalaman – kiu mankis al la LdN por varbi la koron de l’amasoj por lernejo kaj fervoro“ (vd. la ĉapitron pri novaj mistikoj en I.).

La kondiĉo por atingi tiun celon konsistis ankaŭ en la neceso de la efektivigo de la neŭtralismo. Privat klarigis ankaŭ la logikon,

kiu regas dum la senarmigaj konferencoj, kie neniu volas suferi la honton de malvenkisto, perdi sian propran prestiĝon aŭ ricevi truditajn kondiĉojn. En tiaj konferencoj Privat vidis la mankon de racio, konstatante „dezertan kampon“. Lia konkludo: „Enkonduki logikon“ en tiaj konferencoj signifus „kompletan revolucion“.



Por bremsi la blindan nacian pasion Privat postulis en sia libro la enkondukon de „interŝtata moralo“ kaj de „kuna tegmento super la naciaj plafonoj“, dum la ‘animo’, kiun kreis al si ĉiu popolo, „necesus altigi al la sento pri supera kuneco.“ Alie ĝi estus animo „ne kompleta kaj netaŭga por vivo en socio“. Ĉi tie Privat evidente aplikis reformule la ideojn de la zamenhofaj teorioj de homarantismo kaj de la interna ideo de la esperantismo. Privat observis, ke „la rilatoj inter la ŝtatoj estas ankoraŭ multe malpli progresintaj ol la rilatoj inter la homoj“ kaj ke la „diplomata ĝentileco inter ambasadoraj sinjoroj staras multe pli alte ol la bonvolo inter iliaj nacioj“. Finfine Privat venis al jena konkludo: „Por kunvivi pace, necesas tute alia honoresento. Lojale plenumi promeson, digne malŝati venĝon, esti la unua, kiu rezignas regi la ceterajn aŭ ilin timigi perforte, jen honoro pli taŭga kaj inda je kulturnacio.“ En tiu kunteksto Privat pledis por la malaperigo aŭ reduktiĝo de la svisa armeo kaj por la enkon-

duko de utila civila helpservo anstataŭ arma deĵoro.

Apartenante al la kontraŭmilita respektive porpaca protest-literaturo, I. reprezentas tamen iom alian ĝenran kaj idean tradicion, traktante multon pli ol nur la militon mem. Kiel multflanka verkisto kaj ĵurnalisto, kiu samtempe rolis kiel pedagogo-instruisto, Privat verkis per I. ankaŭ utilan *lernolibron* pri prevento de militoj. Ĝiaj instruoj estas influitaj de la humanisma pensado de famaj pacaktivuloj kaj teoriuloj de la neperforto, de socialistaj demokratoj, kvakeroj, civilservistoj, pacidealistoj, mondfederalistoj, humanpolitikistoj k.a. Malgraŭ la leĝera kaj konciza skribstilo tipa por Privat, I. ne estas tro facile digestebla legaĵo. La libro estu prudente traktata de homoj, kiuj havas vidpunktojn tradiciajn, konvenciajn kaj konservativajn, ĝuste rilate temojn kiel ŝtato, religio, armeo, patriotismo. Por trafi la ĝustan aŭ ekskludi la maltaŭgan celpublikon, Privat atentigis en sia enkonduketo pri grava punkto, nome ke en lia libro mankas insultoj por nutri naciisman pasion.

Eĉ se ĝi eble ne liveris la plej konsekvencan solvoproponon por la evitado de militoj mem, I. estis kuraĝa libro – tion devis konfesi ankaŭ la recenzanto en la ĝeneva gazeto *Nouvel Essor*, en kiu en 1932 aperis lia kritiko de la franca libroeldono. Por konstrui pli bonan, pli pacan mondon, Privat sugestis la principojn de la universala federacio, de la internaciismo kaj neŭtraleco, de la tolerado kaj kontraŭ-hegemoniismo. Pro tio li apartenis al la avangardaj progresemluloj de sia epoko militema. Kaj tial ne estas mirinde, ke I. kaj la aliaj prinaciismaj verkoj de Privat ne povis trovi la apartan simpation ekzemple de la IEL-dependaj Eo-asocioj. La naciisocialistoj eĉ ordonis en 1941 detruigi la librostokojn en la pariza eldonejo, kie aperis I. La eldonejo poste ne reeldonis ĝin. Grandparte dank’ al la e-istoj, kiuj tenas la memoron de Edmond Privat en honoro, la teksto restis neforgesita.

En 2006 la teksto de I. reaperis en nova eldono, kun antaŭparolo de Andreas Künzli, ĉe CDELI-Hejme-Libro-Mondo (La Chaux-de-Fonds – Czeladź -Świdnik).

→Edmond Privat

Marcel JACCARD

1902-1973




J. estis kemiisto doktoriĝinta en la universitato de Laŭzano/VD. 1926-30 li laboris kiel industria kemiisto en Le Locle/NE, ekde 1931 kiel kemia inĝeniero kaj kemia analizanto de la svisa laboratorio por materiala ekzamenado en Dübendorf/ZH. Post sia emeritiĝo en 1966 li revenis kun sia edzino al Romandio kaj ekloĝis en Montmollin/NE.

J. aliĝis al la Eo-movado en 1922. Sinsekve li agadis en la EG de Laŭzano, Le Locle kaj Zuriko, la ĉilastan ES li eĉ prezidis (antaŭ 1938). En 1927 li ricevis la superan diplomon de SES, en 1939-42 li estis ankaŭ prezidanto de SES, kies ekzamenan komitaton li prezidis. Krom tio J. estis oficiala kunlaboranto de la →*Svisa Antologio* kaj kunlaboris kun →William Perrenoud, organizante ties prelegojn pri →geonismo kaj la kursojn laŭ la →La ora metodo en Zuriko. En 1938 J. rifuzis reelektiĝon en la CK de SES, ĉar li malkonsentis pri la aliĝo de SES al IEL kaj eĉ sugestis likvidi la asocion, se ĝi ne kapablos trovi taŭgan prezidanton. En *Svisa Espero* de la jaro 1939 J., kiu estis ano de la J.E.A.N.-movado (→Marc Rohrbach), publike protestis kontraŭ la kruela murdorgio aranĝita dum la dua mondmilito. Li esprimis la esperon, ke la popoloj ekkonscios pri la krimo kaj senutileco de tiu nova milito kaj ke la postmilita mondo devus esti reorganizita por atingi daŭran pacon.

→Svisa Esperanto-Societo

Hans JAKOB

1891-1967



J. estis grava Eo-aktivulo de germana deveno kaj kun internacia signifo, kiu laboris dum duonjarcento por UEA en Ĝenevo kaj aktivis sur pluraj aliaj kampoj. De *EdEo* (1933) li estis agnoskita kiel „unu el la plej konataj gvidantoj de la movado“, kaj la *Verda Biblio* (1935) de Izrael Lejzerowicz nomis lin „la patriarko“.

Laŭ propraj indikoj J. studis en la baza kaj realgimnazia lernejoj kaj en la komerca akademio en Mannheim (Germanio), estis asistento en la universitato de Heidelberg (Germanio), studis sociologion, politikajn sciencojn, vizitis kursojn de la latina kaj greka lingvoj kaj okupiĝis pri juro, finante siajn studojn per diplomo pri kontado-librotendado. En 1912 J. venis al Ĝenevo propradire kun la celo praktiki la francan lingvon. Ekde 1913 →Hector Hodler engaĝis lin kiel oficiston en la Centra Oficejo de UEA en Ĝenevo. Sian poresperantan aktivecon J. devis interrompi dum la unua mondmilito por deĵori kiel kalkul-specialisto en Boka Kotorska (Dalmatio) kadre de la aŭstria marministerio (1917-18). En 1942 li trovis postenon kiel oficisto-funkciulo pri kontrolo de kompenso al soldatoj en la Svisa Departemento (ministerio) pri financoj (ĝis 1946) kaj kiel revizoro en la sekcio AHV/AVS (pensioj) en Ĝenevo (1947-57). Post sia oficiala emeritiĝo en 1956 J. reprenis sian profesion laboron ĝis 1963, precipe kiel revizianto pri pagoj al invalidoj de Svislando.



Hans Jakob inter nekonataj personoj

Apud siaj postenoj ĉe la svisaj ŝtataj instancoj J. transprenis funkciojn, ĉefe post 1935, ĉe la ĝeneva kantona polico, laŭ propra aserto kiel specialisto pri nacisocialismo, poste li laboris en aliaj fakoj, plenumante publikajn laborojn kaj taskojn en la ŝtata arkivejo. Iam li estis ankaŭ prezidanto de la ĝeneva sekcio de la socialdemokrata partio kaj prezidanto de la loka Unuiĝo de la ŝtata personaro tutsvisa, ekde 1954 ankaŭ kasisto de ambaŭ organizaĵoj. J. kandidatis (sensukcese) por ambaŭ ĉambroj de la svisa parlamento, kaj ĉe la federacia tribunalo de Svislando li havis la funkcion de juĝanto (1961-66). Krome li plenumadis sociajn funkciojn en la protestanta paroĥo, estis kunlaboranto de la Internacia Laborista Helpejo, de la Svisa Laborista Helpverko kaj de la komitato por la hungaraj rifuĝintoj (1956).

J., kiu fariĝis svisa ŝtatano, estis dufoje edziĝinta (lia unua edzino, Hannie Notz, mortis en 1930 aŭ 1931, la dua, Frieda Schlechterle, en 1958).

La biografio de J. sen Eo ne estus kompleta kaj sen UEA ne imagebla. Al la Eo-movado J. aliĝis en 1905 dank' al la malkovro de Eo-lernolibreto en la kolekto Miniatur-Bibliothek. En la ĝeneva oficejo de UEA J. ekokupiĝis unue pri la libreja servo kaj deĵoris kiel administranto de la revuo *Esperanto*, tiama propraĵo de Hector Hodler, poste sekvis librotenistaj kaj sekretariaj taskoj. Dum la unua mondmilito J. organizis la t.n. Dumilitan Helpservon de UEA, kies celoj estis interŝanĝi korespondaĵojn inter la militantaj landoj, peradi monon precipe al militkaptitoj, sendi pakaĵojn kaj helpi tie, kie la Internacia

Ruĝa Kruco ne intervenis. Postmilito J. mastris UEAn kaj ties Centran Oficejon kiel ĝia ĝenerala sekretario, ekde 1923/24 kiel direktoro (kun vasta kompetenteco laŭstatuta), ĝis 1934.

Samtempe J. estis redaktoro de la *Jarlibro* (1920-42 kaj 1937-40), kompilanto de la revuo *Esperanto* sub →Edmond Privat, prizorganto de la *Oficiala Bulteno de UEA*. Por generi aldonajn enspezojn, ĉar la kotizoj neniam sufiĉis por plenumi la celatan kaj plenumotan laboron, J. starigis servojn pri turisma varbado, komerco, hoteloj, financoj, libroservo.



La maldekstra foto de Jakob aperis en *Rimporteto*, la dekstra en *Vikipedio*

En 1934 J. demisiis en Stokholmo kiel protesto kontraŭ la nereelektado de →Eduard Stettler, →Edmond Privat, Johannes Karsch kaj aliaj estraranoj. Post la fondo de IEL (1936) J. revenis por refunkciigi la ĝenevan oficejon de UEA. Tiun riskon li entreprenis, uzante por vivi la kapitalon de sia viv-asekuro (nur en 1942 li trovis ŝtatan postenon kaj tamen daŭrigis paralele sian laboron por UEA, nun honorofice).

En 1939 J. organizis, helpata de aliaj, la subtenon al la familio Zamenhof per regula sendado de nutraĵoj. Dum la dua mondmilito J. helpis organizi analogan helpagadon kiel li faris jam dum la antaŭa milito; ĉifoje ĝi nomiĝis E-ista Interhelpo kaj etendiĝis favore al militkaptitoj kaj rifuĝintoj. Kiam la milito finiĝis J. lanĉis helpagadojn favore al samideanoj en landoj suferintaj dum la milito.

En 1947, ne sen la kunlaboro de J., okazis la reunuiĝo de UEA kaj IEL - la nova organizo

konservis la titolon UEA. En 1955 (UK Bologna) J. forlasis la estraron de UEA, al kiu li apartenis de post la reunuigo, kaj ekzigis ankaŭ kiel redaktoro de *Esperanto*, kiun li redaktis kaj eldonis ekde 1942/43, kaj ricevis la titolon de honora redaktoro. Al la komitato de UEA J. apartenis ĝis 1961, kiam li estis eksigita el tiu organo.



Hans Jakob prelegas dum Esperanto-aranĝo

J., kiu havis historiografiajn kaj literaturajn interesojn, kolektis materialon por iam eldona dua eldono de *EdEo* kaj por la enciklopedia projekto *Kiu estas kiu?*, pretigis prespretan (aŭtobiografiecan) *Historion de UEA*, kompilis etimologian verkon, kiu traktas la originon kaj nomojn de popoloj, kaj tiucele zorge kolektadis dum jardekoj kelkmil vortojn. Li tradukis ankaŭ verkaĵojn el slavaj literaturoj (ekz. el P.J. Šafařík) kaj kompilis, en Eo, specon de kompendio *Kion volas Hitler*, por pli bone komprenigi al la publiko la esencon de la libro *Mein Kampf*.

J. verkadis por *Esperanto* artikolojn sub diversaj pseŭdonimoj (Beppi Basler, Georges Agricola, François Hayotte, Rideamus, Allobrogo) kaj surpaperigis serion de artikoloj pri Eo-movadaj temoj. J. ŝatis kolekti informojn pri projektoj de internaciaj planlingvoj

kaj posedis riĉan bibliotekon. Alia merito de J. estis, ke dum la jaroj, kiam neniu interesiĝis prie, kaj en la timo, ke la milito povus atingi ankaŭ Ĝenevon, li ŝirmis la UEA-bibliotekon en siaj ejoj, parte en Palaco Wilson, kie li laboris, parte en sia propra loĝejo, kie la UEA-biblioteko aŭ tio kio restis de ĝi, estis deponita.



Jakob dum Zamenhofa Vespero en 1951




Kun gesinjoroj Privat kaj Hans Kürsteiner

Kvankam la laboro de J. por UEA en Ĝenevo estis tre longdaŭra kaj sindona, la rilatoj inter li kaj la asocio ne estis ĉiam glataj. Male ili estis tre tensio- kaj konflikto-plenaj, havante sian kernon en la kunpuŝiĝo de diverĝaj ideoj, konvinkoj, sintenoj, agmanieroj kaj decidoj pri la strategio kaj funkciado de la asocio inter J. unuflanke kaj la (ŝanĝiĝanta) estraro/komitato de UEA sub ties prezidantoj Louis Bastien (1934-36), Ernfried Malmgren (1947-56) kaj Ivo Lapenna (1964-74) aliflanke. Multaj vidis aŭ celis vidi en J. la kulpo-kapron pro la disdubiĝo inter UEA-IEL (1936-47). La alia konflikto-kampo koncernis, precipe en la 1950-60aj jaroj, la financajn kaj

librotrenadajn aferojn kaj la Bibliotekon Hodler. (→Universala Esperanto-Asocio, →Bibliotekoj)



Hans Jakob kaj Edmond Privat en 1951



Iom post iom J. seniluziiĝis de la kvereloj kun la komitato kaj estraro de IEL resp. UEA. Liaj fortoj elĉerpiĝis, J. mem rapide kadukiĝis kaj serioze malsaniĝis. Dum la UEA-materialo estis en pluraj ondoj transportita de Ĝenevo al Roterdamo, la privataj arkivaĵoj de J. povis esti transdonitaj al →CDELI nur post aŭkcio de la ŝtato kaj novaj perturboj, ĉar lia filino rifuzis la heredaĵojn de J. pro la timo, ke ŝi devas transpreni liajn monŝuldojn.

Kiam J. fariĝis 60-jara en 1951, *Svisa Espero* omaĝis lin kun foto. En sia nekrologo, SES honorigis J. kiel pioniron, „kiu kuraĝis ĉion oferi je la profito de la internacia lingvo”. La morto de J., kiu „donis al li la antaŭe ne trovi-

tan pacon” (*SE* 6/1967), valoris por la revuo *Esperanto* de UEA nur dek kvar liniojn kun la listigo de liaj funkcioj. La hungara Eopoeto Kálmán Kalocsay (1891-1976) dediĉis al J. jenajn strofojn:

*Hans Jakob - mastro de UEA.
Kalkulas, pesas kaj mezuras.
La mondon per fadenoj ŝnuras,
kiel per reto aranea.*

*Sub lia gvido korifea
delegitaro servkuras.
Hans Jakob - mastro de UEA,
kalkulas, pesas kaj mezuras.*

*Informe pri l'movad' ĉiea
Jarlibron zorge li poluras,
malbonon ofte ja aŭguras,
sed spitas ĝin per peno krea
Hans Jakob - mastro de UEA.*

Ĉirkaŭ la jaroj 1957-58 J. surpaperigis memuarojn pri sia vivo en la servo de UEA. Trovita de lia filino, kiu vivis en Antverpeno (Belgio), la manuskripto estis donacita al Flandra Esperanto-Ligo, kiu eldonis ĝin libroforme en 1995 (Red. M. Fettes. *Hans Jakob. Servisto de l'ideo. 50 jaroj ĉe Universala Esperanto-Asocio - 1908-1958*. Recenzo de Halina Gorecka en *OdEo* 2/1997).

J. havis nevon kun la nomo *Edouard Notz* (1904-44), kiu estis komandanto de la aerprotekta bataliono de Ĝenevo kaj ĉefo de la aerprotekta servo. Notz multe helpis al la organizantoj de la 17a UK kaj desegnis la kongreskarton.

→Universala Esperanto-Asocio →Bibliotekoj
→Hector Hodler →Ĝenevo →CDELI

Karl JOST

1876-1952



Profesie J. estis tipografo, kompostisto, mekanikisto, hobia astronomo, aktiva socialdemokrato el t.n. proleta familio, kiun oni perceptis kiel tipon de laboristo el la heroeca luktado por justa laborgajno.


J. estis e-isto de 1903. En 1905 li kunfondis la zurikan ES (kaj evidente ankaŭ aliajn EG en la regiono) kaj aliĝis al SES, kies honora membro li fariĝis. Dum la Ido-krizo en 1907/08 li firme defendis Eon kontraŭ idistaj atakoj, akre disputante kun la konata zurika idisto → Albert Nötzli. La disblovon de la Ido-krizo en Svislando oni dankas grandparte al J. En tempoj, kiam multaj jam malesperis pri la estonto de Eo, J. kompilis modelajn Eo-librojn por lernado, legado kaj kantado. Inter liaj libroj elstaris la *Esperantista Kantaro* (Zürich 1907, 2a eld. 1911), la *Legolibro por kursanoj* (Zürich 1908) kaj precipe lia 110-paĝa *Volkslehrbuch der internationalen Hilfssprache* (Zürich 1915). J. verkis ankaŭ centojn da propagandaj artikoloj kaj organizis multajn Eo-kursojn en Zuriko. Laŭ liaj samtempoj J. tiom perfektigis en Eo, ke dum la 13a UK (Prago 1921) oni nomis lin „la vivanta vortaro“. Li tradukis verkaĵojn el W.J. von Goethe, ekz. *Rozo erikeja*, tiel ke en Eo-rondoj li estis nomata ŝerce ‘Eo-Goethe’. Sian lingvan talenton J. ankaŭ pruvis per tradukoj de mondfamaj poeziaĵoj kaj per aliaj literaturajoj (*Lorelej’* de H. Heine, *Al mia Patroland’* de G. Keller, *Modesta bukedo*, *Prozo kaj poemoj originalaj kaj tradukitaj*, 1948). En 1919 J. redaktis *Svisa Espero* kaj dum la dudekaj jaroj prizorgis la bibliotekon de SES. Sian propran kaj tre riĉan libron li mem testamentis al la centra biblioteko de Zuriko.

Jam ekde 1928 lia aktiveco malfortiĝis pro malbona sano kaj psika krizo, al kiu nelaste kontribuis la neklara evoluo de la Eo-movado. J. posedis ĝardenan dometon sur Zürichberg, kiu portis la ŝildon *Lernu Eon, la mondhelpingvon*.


→Instruado →Svisa Esperanto-Socieito →Zuriko
→Bibliografio

JUNULARO

La pioniroj de la svisa kaj samtempe internacia junulara Eo-movado nomiĝas →*Edmond Privat* (1889-1962) kaj →*Hector Hodler* (1887-1920), ambaŭ ĝenevanoj. 1903-9 ili eldonis en Ĝenevo la periodaĵon *Juna Esperantisto* (*de Ĝenevo*). La gazeto ludis trioblan rolon: kiel bulteno de la *Ĝeneva Klubo de Junaj E-istoj*, kies estroj mem estis Hodler (prezidanto) kaj Privat (sekretario), kiel internacia organo de la junaj e-istoj kaj kiel ligilo por la internacia korespondado.



Privat kaj Hodler kiel junuloj



Titolpaĝo de *Juna Esperantisto* (*de Ĝenevo*)

La unua nomaro tiu tiu ĝeneva junulara klubo (junio 1903) nombris 15 anojn. La inviton al porjunulara kunveno en 1904, organizita de

Privat, sekvis 25 personoj. La laboro de Privat kaj Hodler trovis la simpation de la ĝeneva filozofo → *Ernest Naville* (1816-1909).

Junular-Sekcio de SES / Eo-Junularo de Svislando (EJS): La fundamento de la junulara Eo-movado en Svislando post la dua mondmilito stariĝis komence de 1951, kiel reago al la progresanta maljuniĝo de la pionirgeneracia aktivularo. Januare kunvenis kelkaj junaj e-istoj en Baden/AG por ellabori provizoran asocian regularon. La ĝenerala kunveno de SES en Zuriko, kaj precipe Edmond Privat, la pioniro de la unua periodo, aktive subtenis la klopodojn de la gejunuloj kaj garantiis al ili moralan kaj financon helpon. Aprile staris la Provizora Junulara Komitato aŭ *Junular-Sekcio de SES*, kiu konsistis el SES-membroj ne pli ol tridekjaraj. La sekcio, kiu estis gvidata de → *Bruno Graf* (*1928) kaj → *Hans Herrmann* (1926-2002), nombris tiam 12 membrojn, krom Graf kaj Herrmann ankaŭ la aktivulojn Oskar Wegmann kaj ties edzinon (Winterthur), Adolf Urscheler kaj Gertrud Weigelt (Berno), Alois Koller kaj Hans Widmer (Baden).

La unua oficiala junulara kunsido okazis en oktobro 1951 en St. Gallen. En majo 1952 la sekciestro Graf organizis dutagan internacian junularan kunvenon en Bazelo. La aranĝo, okazinta en la hoteloj Spalenhof kaj Rialto, allogis kvindekda partoprenantojn el Svislando, Germanio kaj Francio kaj trovis la intereson ankaŭ flanke de ŝtataj instancoj. Dum la kunveno aperis oficialulo de la bazelurba departemento pri edukado (Fritz Wenk), kaj estis laŭtlegita la bondezira mesaĝo de Max Petitpierre (1899-1994), federacia ministro de Svislando (1944-61). Trilingva kongresa rezolucio sugestis la aprobon kaj aplikadon de Eo kiel ilo por pli bona internacia kompreniĝo kaj rekomendis ĝian instruadon en la svisaj lernejoj. La gazetoj *Basler Nachrichten*, *National-Zeitung* kaj *Arbeiterzeitung* raportis pri la evento.

Sub la novaj gvidantoj → *Max Abegg* (*1937), kiu aliĝis en 1953 al la Eo-movado, kaj → *Claude Gacond* (*1931), kiu en 1953 partoprenis kun Eric Benoît la 9an Internacian Junularan Kongreson de TEJO en Wörgl (Aŭstrio), efektiviĝis tuta serio de junularaj tagoj kaj semajnfinoj: en 1954 en Neuchâtel, en 1955 en Biel-Bienne, en 1956 en Solutur-

no, en 1957 en La Sagne/NE, Neuchâtel, Berno, Estavayer-Le-Lac/FR kaj La Chaux-de-Fonds; en 1958 en Bazelo, Soloturno, Sainte-Croix/VD, La Neuveville/BE kaj Lucerno; en 1959 en Tête-de-Ran/NE, Langenthal/BE, Romanshorn/TG kaj Laŭzano; en 1960 en La Sagne, Biel-Bienne kaj Neuchâtel. La J. trovis varman subtenon de la tiama SES-prezidanto → *William Perrenoud* (1898-1984).



Claude Gacond kaj Max Abegg

Pliaj kulminoj en la agado de tiu periodo estis la fondo de *Amikaro de la Junularo E-ista*, de la kategorio *Simpatiantoj de Eo* kaj la eldono de *La Juna Voĉo*, redaktata unue de → *Max Abegg*, kiu 1955-57 estis vicprezidanto, poste prezidanto de EJS kaj komitatano de TEJO, poste de *Hans-Joachim Fuchslocher* (*1936). Depost 1962 Abegg ne plu aktivis en la Eo-movado, sed li restis UEA-delegito. → *Walter Giannini-Aeppli* (1914-2003) sponsoris la titolpaĝon de la bulteno.




David Buhlmann kaj Bruno Graf

La skiferioj en Adelboden kiel feria aranĝo de la Eo-J., unufoje en Bonderlen en vintro 1956/57 kaj ĉiuj ceteraj en pli luksa ĉaledo en Boden, okazis sub la ĉefa gvidado de →*Claude Gacond* (*1931), la fratinoj kaj kuiristinoj Andrée kaj Cosette Giroud (poste Cop resp. Sandoz) entute 21 fojojn, ĝis 1977. La feriadon partoprenis ankaŭ →Michel Frésard, →Max Abegg, Michel Huot, →Bruno Graf kaj ties tiama fianĉino Trudi, Hans-Joachim Fuchslocher, Gertrud Weigelt, Marie-Louise Ackermann (poste Mürger) k.a. Dum la jaro gejunuloj partoprenis ankaŭ la feriajn kursojn en la →Kastelo Münchenwiler kaj en diversaj Eo-aranĝoj en eksterlando.

kiuj fariĝis tre aktivaj en la movado: →Sonja Brun (*1930), →David Buhlmann (*1933), István Mórocz (*1935), Paul Scherer (*1933) k.a.



La ĉaledo en Adelboden



Titolpaĝo de la EJS-bulteno *La Juna Voĉo* (1960)

Ekzistis vojaĝfonduso de la junulara sekcio, kiu estis nun nomata *Esperanto-Junularo de Svislando (EJS)*, kun la celo subvencii parton de la vojaĝelspezoj de la gejunuloj kaj tiel instigi la junajn SES-anojn partopreni la Eo-kunvenojn. La SES-funkciulo →Otto Walder (1912-88) promesis al la gejunuloj rabaton por Eo-libroj aĉetitaj en lia libroservo. Diversaj varbkampanjoj rikoltis novajn membrojn,

Malgraŭ tiuj belaj sukcesoj de la junulara sekcio, ĝia krizo eksentiĝis en 1957/58, kiam la pli aĝaj membroj, pro atingo de sia aĝlimo, devis forlasi la sekcion. Tiam parton de la laboro de EJS efektivigis la nova organizo Esperanto-Edukistaro de Svislando (EES), fondita en februaro 1958. Ĝian agadon portis esence la samaj funkciuloj de EJS.

Svisa Esperanto-Junularo (SEJ): Komence de la sepdekaj jaroj estis starigita SEJ, kiu estis konceptita kiel kuniĝo de junaj e-istoj dise loĝantaj tra la lando, kaj kiel Landa Sekcio de TEJO. Ĝia ĉefa motoro nomiĝis →*Andres Bickel* (*1954) el Ĝenevo, kiu 1974-80 prezidis la asocion. Pro ne ĉiam glataj rilatoj kun SES, SEJ strebis al emancipiĝo disde SES kaj en 1974 diskutis statutprojekton por Helveta Eo-Junularo. La projekto tamen neniam realiĝis. Laŭ interkonsento kun SES en 1975 SEJ deklaris sin memstara organizo. Dum la kontaktoj kun SES malvarmiĝis, SEJ alproksimiĝis al KCE, organizante kun ĝi komunajn kulturajn aranĝojn. Inter la plej signifaj aktivecoj de SEJ menciindas ĝiaj someraj migradoj, la kunlaboro en la skiferioj en Adelboden, lingvokursoj, porinfanaj semajnfinoj, eldonado de la bulteno *Hej!* kaj partopreno en eksterlandaj Eo-aranĝoj. En 1977/78 SEJ (precipe Andres Bickel kaj Marie-Louise Mürger) ekfunkciigis la teatran trupon *La Vagabondoj* kun la celo praktiki Eon per artaj esprimmanieroj, diskonigi la teatran kaj kantan literaturon en Eo kaj

agrabligi e-istajn renkontiĝojn (*SER* 6/1977). Aliaj tiamaj aktivuloj de SEJ estis: →Nicole Margot (*1943), Jean-Daniel Bosko, Martin Meyer, François Mottet, →Daniel R. Mühlemann (*1950), Bertrand Pilloud, →Dietrich Weidmann (*1960), Chantal Gacond, Nicolas Greber (*1962), →Andreas Künzli (*1962) k.a. Poste aperis en la Eo-J. ankaŭ Anne-Laure Oguey el Ĵuraso, Ernst Gadiant (*1956) kaj Ueli Haenni (*1955) el Berno.

En majo 1977 SEJ organizis ankaŭ semajnfiron por infanoj, kiun partoprenis 12 infanoj ĉefe 12-jaraĝaj el la kantoj Berno, Neuchâtel kaj Vaŭdo.



Marie-Louise Münger, infano kaj tiama edzo en Adelboden (1977)



Nicole Margot, Andres Bickel, Daniel Muhlemann

La krizo de SEJ, kiu kondukis al ĝia oficiala likvido la 29an de novembro 1980 en Versoix/GE, havis, el la vidpunkto de SEJ, plurajn kialojn: La esencaj agadoj de SEJ koncentriĝis ĉirkaŭ la malfortaj junularaj grupiĝoj lokaj. Pri la agado interesiĝis precipe nur romandoj. Oni baze neglektis kotizi kaj administri la asocion, kaj oni havis la impreson, ke la responsuloj de la svisa movado ne sufiĉe atentis la agadon de la gejunuloj. La restinta financa havaĵo estis disdividita inter La Vagabondoj kaj la junularaj ĉeloj en Ĝenevo

kaj Laŭzano, la arkivaĵoj estis deponitaj en CDELI. Por ne rompi la kontakton kun la ‘plenkreskula’ movado, kiel junularaj komisiitoj de SES estis nomitaj sinsekve François Mottet kaj Andy Künzli.



François Mottet kaj la siglo de SEJ



Dietrich (Didi) Weidmann

Junularo E-ista Svislanda (JES): De la mal-fondo de SEJ, la svisaj Eo-gejunuloj restis tri jarojn sen organizo. En februaro 1983, laŭ iniciato de la zurikano →Dietrich (Didi) Weidmann (*1960), aktivulo de TEJO kaj Biciklista E-ista Movado Internacia (BEMI), estis starigita Junularo Esperantista Svislanda (JES). Nun JES difinis sin memstara Landa Sekcio de TEJO kun propra statuto. En la unua periodo de ĝia ekzistado, JES koncentriĝis esence je la alemanaj regionoj (Zuriko, Bazelo, Lucerno, Schaffhausen, Rheineck/SG). Iom post iom ĝi radiis ankaŭ al

Tiĉino kaj Romandio. La aktivuloj de JES kapablis rapide kreskigi sian membro-nombrojn kaj realigis multajn aktivecojn: ili laboris en KCE okaze de ties semajnfinoj de la bona volo, organizis bicikladon en Ĵuraso, partoprenis la festivalojn en Gurten apud Berno, kunlaboris kun →Sunhejmo en Rheineck/SG, eldonis la periodaĵon *La junaj E-istoj informas* kaj kune partoprenis en IJK de TEJO. Weidmann, la ĉefa motoro de JES, okupis ankaŭ gravajn postenojn en TEJO (Akomitatano, ĝenerala sekretario), dum Andy Künzli redaktis la organon *TEJO-tutmonde* (1985-91) kaj oficis kiel vicprezidanto kaj estrarano pri Landa Agado de TEJO (1990-93).

En la dua duono de la 1980aj jaroj JES ekstagnis, pli malpli pro la samaj kialoj, kiel en pli fruaj tempoj la antaŭaj junularaj Eo-organizoj. En aŭgusto 1991 la tiamaj estraranoj Ueli Haenni (prezidanto), Anne-Laure Oguey kaj Didi Weidmann transdonis la prezidan gvidadon al nova generacio kun *Marion Bélisle-Grosjean* (*1975) el Les Brenets/NE, filino de →Mireille Grosjean-Robert. Marion finis la gimnazion kaj konservatorion en La Chaux-de-Fonds per la abiturientiĝo. Ŝi lernis Eon en 1985 ĉe KCE, trapasis la mezan ekzamenon de ILEI kaj ekaktivis en 1989. En 1995 ŝi estis alektita estraranino (kasistino) de TEJO. La seminario de TEJO/KER en La Chaux-de-Fonds en 1993 kun la temo 'Neŭtraleco - ĉu alternativo al ideologioj' estis organizita de Marion Grosjean kaj Andy Künzli (temo) kaj estis en tiu tempo unu el la kulminoj de la svisa junulara agado kun internacia dimensio.

Kiel nova aktivulo aldoniĝis *Rolf Ernst* (*1970), nomata *rolfo*, kiu lernis Eon en 1988 memstude (supera diplomo en 1993). En 1989 li aliĝis al UEA, en 1992 al JES kaj en 1993 al la zurika ES, fariĝis en 1992 vicprezidanto de JES kaj en 1993 transprenis la redaktadon de la JES-periodaĵo *la svisa kanguruo*, kiun li kuniniciatis. En 1995 *la svisa kanguruo* alprenis la titolon *la alpa kanguruo* kaj tiam estis komuna eldonaĵo de la aŭstria kaj svisia Eo-junularoj.



Titolo de la JES-bulteno *la svisa kanguruo* (1993)



Rolf Ernst kaj Marion Bélisle-Grosjean



Vera Pochanke



Retpaĝoj sub www.jesperanto.ch



Unua paĝo de la JES-bulteno (2002)



Gejunuloj: Joëlle Grosjean, Laurent Burgbacher, Luc Allemant, Benno Frauchiger (supre) Benno Frauchiger kaj Laurent Burgbacher (sube)

Junularo Esperanta Svislanda (JES): La 8an de decembro 2001 Vera Pochanke kunvokis ĝeneralan asembleon de JES por revigligi la asocion post tri jaroj da malaktivecoj. La statuto de JES estis ŝanĝita – la novaj nomoj estas *junularo esperanta svislanda, jeunesse espérantophone suisse, giuventetgna esperantista svizra, gioventù esperantista svizzer, junges esperanto schweiz*, kaj kun jena statuta celaro: ebligi al la junuloj konatiĝi kun aliaj kulturoj en la mondo; helpi trapasi lingvajn barilojn ofertante aktivecojn esperantlingvajn; subteni daŭreble la lingvan diversecon en Svislando; proponi vivantan utopion. Nova siglo por JES estis akceptita. Dum du jaroj la organizo estis prezidata de *Benno Frauchiger*. En aŭtuno 2003 la komitato konsistis el *Laurent Burgbacher* (*1976, Laŭzano; prezidanto), *Adélaïde Charrière* (Massongy, vicprezidanto), *Benno Frauchiger* (Bazelo, kasisito), *Joëlle Grosjean* (*1978, sekretario). Pri la agado kaj kunvenoj de JES sporade raportas la bulteno *Jes! Kompreneble...* (kun subvencio de SES) kaj la retpaĝaro www.jesperanto.ch.



ĴURASO

Kantono en okcidenta Svislando franclingva, (francilingve: Jura, mallong. JU: 837 km², 69'200 loĝantoj/2005), ĉefurbo Delémont. (Ĝis 1978 la ĵurasaj distriktoj Delémont, Ajoie / Porrentruy kaj Franches-Montagnes / Saignelégier apartenis al la berna kantono.)

Laŭ *Svisa Espero* 1/1905 iu s-ro Etienne prelegis pri Eo en Delémont, post kio ĉefe

komercaj gazetoj favore raportis pri la afero. En la sama jaro iu gazeto en Porrentruy aperigis artikolojn pri Eo de →Jean Wenger el Neuchâtel.

El la ĵurasa kantono devenas →*Michel Frésard* (*1930), kiu en 1959 eksperimente instruis Eon al bazlernejoj en Les Bois/JU. En la 1980aj jaroj en Porrentruy/JU kiel UEA-delegitino oficis la infanedukistino Anne-Laure Oguey.

ĴURNALISMO, ĴURNALISTOJ

Dekomence kelkaj profesiaj ĵurnalistoj sentis sin allogataj de Eo kaj de aliaj planlingvoj kaj pretis disponigi siajn fakajn konojn al la Eo-movado kaj al la diskonigo de Eo per amasaj komunikiloj, precipe gazetaro, radio kaj per verkado de taŭgaj artikoloj, varbbroŝuroj kaj flugfolioj.

Unu el la fruaj ĵurnalistoj aliĝintaj al la Eo-movado nomiĝis →*Hans Joachim Unger* (1894-1984), profesia ĵurnalista kun doktora titolo. Postmilite li estis redaktoro de la periodaĵo *Die Reise* kaj prezidanto de Svisa Unio de turismaj ĵurnalistoj. En la Eo-movado li disponigis sin kiel redaktoron de diversaj periodaĵoj ligitaj ĉefe kun komerco, turismo kaj Eo-propagando, kiel *Internacia Komerca Revuo* (Zürich 1919-22), *Internacia Komerco* (kiel aldonaĵo de *Eo Triumfonta*; redaktata kun R. Kreuz; marto 1923 ĝis oktobro 1924), *Esperanto-Press* (Zürich 1943-49), *Turista Mondo* (aperis kvaronjare 1969-72, riĉe ilustrita en sufiĉe alta eldonkvanto).

La profesiaspekta periodaĵo *Monda Poŝto* (*Weltpost*), kiu komprenis sin kiel „revuon por la propagando de Eo kaj por korespondado kaj kolektantoj en lingvoj Eo, germana, franca kaj angla” aperis inter 1900 kaj 1928 en Fischenthal/ZH kaj estis redaktata de *Jean Thalmann*, kiu estis ankaŭ prezidanto de la t.n. Monda Ligo. Inter majo 1912 kaj junio 1914 *Monda Poŝto* / *Weltpost* aperis alterne kun *Svisa Espero*. Eo-redaktoroj de *Monda Poŝto* estis →*Friedrich Uhlmann* (1881-1938), kuracisto en Huttwil/BE, kaj *Armand Caumont* (→Vaŭdo). La e-isto kaj framasono Uhlmann agadis ankaŭ kiel ĉefredaktoro de la profesie produktata Eo-periodaĵo *Vespera Horo* (Huttwil 1910) kaj kunlaboris kun la

gazetoj *Esperanto* (UEA) kaj *Internacia Medicina Revuo*.




Titolpaĝo de *Monda Poŝto*



Titolpaĝo de *Vespera Horo*

→*Edmond Privat* (1889-1962), ŝatata de la svisa kaj internacia e-istaro kiel multflanka talentulo, studinte lingvosciencan, literaturon kaj belartojn, mem fariĝis atentata ĵurnalista de sia tempo. Inter 1913 kaj 1916 li laboris kiel publicisto en Parizo kunlaboro kun la periodaĵo *Le Temps*, vojaĝis tra Aŭstrio-Hungario kaj Pollando kiel gazetara korespondanto. Li kunlaboris kun la socialistaj gazetoj *Le Droit du Peuple* (ekde 1919), *La Sentinelle* (ĝis 1956), kun la kooperativaj periodaĵoj *Le Coopérateur genevois* (1929-44) kaj *(La) Coopération* (1931-62). En 1944-49 li gvidis la periodaĵon *L'Essor*, kunlaboro kun →*Eric Descœudres*. En la Eo-movado Privat komencis ĵurnalismumi en 1903, lanĉante la gazeton *La Juna E-isto* (→Junularo). En la revuo *Esperanto* de UEA, kiun li redaktis inter 1920 kaj 1934, aperis liaj klarvidaj, elegantstilaj artikoloj. En 1925 Privat, kiu ankaŭ verkis plurajn librojn, kunfondis Ĝenevan Radion kaj en 1946 lanĉis ĉe Svisa Kurtonda Radio (poste nomata Svisa

Radio Internacia SRI, →Radio) la disaŭdigon de la Eo-elsendoj, kiun li realigadis ĝis sia morto en 1962.



Jean Thalmann, Hans-Joachim Unger, Arthur Baur

La fama kolego de Privat, →Hector Hodler (1887-1920), kiu jam estis konata pere de artikoloj en la revuoj *Juna E-isto*, *Tra la Mondo*, *L'Espérantiste*, en 1907 transprenis la redaktadon de la revuo *Esperanto* el la manoj de ĝia fondinto kaj redaktoro Paul Berthelot (1882-1910) - la 12an de februaro 1907 aperis la unua numero. Kaj baldaŭ ĝi fariĝis la centra organo de la Eo-movado. La specifaj kvalitoj de Hodler estis priskribitaj fakte kiel tiuj de ĵurnalisto: li posedis la talenton prezenti komplikajn problemojn en komprenebla maniero. En ĉi tiu kunteksto oni ne forgesu ankaŭ la redaktan laboron de →René de Saussure (1868-1943), la frato de la fama lingvosciencisto Ferdinand de Saussure (1857-1913). En Ĝenevo René malfermis kaj direktis la Internacian Sciencan Oficejon E-istan, kie estis redaktata kaj administrata *Internacia Scienca Revuo*. Multajn jarojn →Hans Jakob (1891-1967) kunlaboris en la redaktado de *Esperanto* kaj ŝatis verki pri multaj temoj.

La plej elstaran profesian ĵurnaliston svisalemanan kaj samtempe aktivan e-iston la svisa Eo-movado posedis en la persono de →Arthur Baur (*1915). La ĵurnalista kariero de ĉi tiu zurikano komenciĝis kiel redaktoro de la gazeto *Wochenblatt von Pfäffikon* (1942-45) kaj estis daŭrigata ĉe *Neue Berner Zeitung* kiel redaktoro (1945-59) kaj ĉefredaktoro (1959-67). Inter 1967-80 Baur estis ĉefredaktoro de *Der Landbote* en Winterthur/ZH. Baur membris en pluraj organizaĵoj kiel Svisa Ĵurnalista Asocio, prezidis la Bernan Ĵurnalan Societon, estis estrarano de la Zurika Ĵurnalista Societo kaj membris en la CK de

Svisa Ĵurnalista Unuiĝo (VSJ) ktp. Al la naci-lingva (fak-)publiko Baur fariĝis konata kiel aŭtoro de klasikaj, regule reeldonataj kaj ofte uzataj lernolibroj pri la svisgermana (alemana) lingvo kaj kiel verkanto de studoj pri la retoromanĉa lingvo. Ankaŭ post sia emeritiĝo (1980) Baur verkis prilingvajn artikolojn por diversaj svisaj gazetoj. Gravan servon al la Eo-movado Baur faris kiel redaktoro de la bultenoj *Svisa Espero* (1951-62) kaj *SER* (1980-86), kiel gvidinto de la informservoj de la 31a UK kaj 32a UK (ambaŭ okazintaj en Berno, 1939 resp. 1947) kaj de la 64a UK (Lucerno 1979), kaj signifan kontribuon li faris ankaŭ kiel verkinto de la kursoj *Esperanto in 5 Lehrbriefen* (1942) kaj *Esperanto per Post* (1958, reeldonita en 1963), kaj nelaste ankaŭ kiel ĉefredaktoro de la →*Svisa Antologio* (1939). Dum pluraj jardekoj (1947-91) kiel ĝia redaktoro Baur prizorgis ankaŭ parton de la Eo-programo de SRI, ofte en akompano de sia edzino *Heidi Baur-Sallenbach* (1916-2006), kiu laboris kiel libera ĵurnalistino kaj teatra kritikistino. La libro de Baur →*La fenomeno Svislando* aperinta en 1979, la jaro de la lucerna UK, rezultigis kiel bela frukto de lia multjara radioprelegado. Komisiita de SES, Baur verkis 1954-87 ankaŭ la servon *Esperanto-Information* por la nacilingva gazetaro, de kiu aperis 160 eldonoj en la germana lingvo, dum la francilingvan version prizorgis →*René-William Perrenoud*. Krome Baur skribis diversajn informartikolojn kun faka karaktero (ekz. *Von der Utopie zur Wirklichkeit, Geschichte der Plansprachen*, kiu aperis en *Landbote*, la 5an de junio 1976, kaj poste kiel aparta broŝureto) kaj inform-flugfoliojn (*Esperanto heute*).

→*Giorgio Silfer* (*1949) kaj →*Perla Martinelli* (*1938) estas neforgeseblaj redaktoroj de la revuoj →*Literatura Foiro*, *Planlingvistiko* k.a.; →*Claude Gacond* (*1931) kiel nelacigebla kaj detal-ama redaktanto de *Monata Cirkulero* (KCE), de *SES informas*, sed ankaŭ kiel parolisto de la Eo-radioelsendoj ĉe SRI kaj kiel aŭtoro de multaj priesperantaj francilingvaj dosieroj en la periodaĵoj *La Sentinelle*, *L'Essor* kaj *Coopération*.

Eble malpli konata estas la nomo de →*Immanuel Olsvanger* (1888-1961), kiu agadis kiel

natursciencisto, ekonomiisto, verkisto kaj ĵurnalisto.

Pri la problemo de la aplikado de Eo en lernejoj iom interesiĝis *Fritz Wassmann* (*1936), ĵurnalisto, instruisto, ekologo kaj biologo, iama alelektito de la CK de SES kaj de la direkta komitato de KCE.

Ĉi-loke indas mencii la nomojn de tiuj e-istoj kaj planlingvanoj, kiuj ne estas profesiaj ĵurnalistoj, sed kiuj plenumis regule kaj dum multaj jaroj tre gravan laboron kiel amatoraj redaktoroj de diversaj Eo-periodaĵoj kaj aliaj servoj: →Madeleine Stakian-Vuille – *Brasikfolio*; →Erna Döring – *La Migranto* kaj *Kuriero de Esperanto*; →Kurt Greutert – *Svisa Fervojisto* kaj *Tiĉina Informilo*; →Otto Walder kaj →Claude Piron (*1931) – *Svisa Espero*, *SER*; →Andreas (Andy) Künzli – *La Lucerna Progreso*, *TEJO tutmonde* kaj parto de la Eo-elsendoj de SRI; →Dietrich Weidmann – diversaj junularaj kaj zurikaj eldonaĵoj; →Rolf Ernst – *La svisa (alpa) kanguruo*; →Mireille Grosjean-Robert – franclingvaj informoj al la romanda gazetaro; →Tazio Carlevaro (*1945) – diversaj bultenoj; →Albert Nötzli – diversaj Ido-revuoj; →Alphonse Matejka – *Cosmoglotta*; →Ric Berger – *Curiero International* kaj *Revista de Interlingua*; Jakob Walser – *Jveizapot (Volapük)*.

Carl Johannes Pollog (1899-1975), doktoro pri filozofio, estis verkisto kaj sendependa ĵurnalisto, vivanta ekde 1934 en Bazelo. Kiel iama e-isto li aliĝis en 1942 al Occidental-Interlingue, ofte kontribuante artikole kaj recenze al *Cosmoglotta*.

→Gazetaro nacilingva